n-ro 71

januaro 2001

# La Merkato

ISSN 0941-9306

Ni deziras al la membroj de IKEF kaj al la ceteraj legantoj de La Merkato feliĉan kaj prosperan jaron 2001 kaj esperas renkonti vin en aprilo en la staĝo en Storckensohn, aŭ dum la somero, en la Universala Kongreso de Esperanto.

La estraro de IKEF

**Enhavo**

Anoncitaj aranĝoj . . . . . 3
Lernu komercon interrete kaj esperante . . . . . 4
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . 5
IKEF-laborplano 1998-2003 . . . . . 6-7
Raporto pri KAEST 2000 . . . . . 8

**La Merkato** (LM)(ĝis numero 26: Laŭokaza Novaĵletero) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)esperanto.be.

---

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org aŭ www.xs4all.be/~rotsaert/ikef/

---

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptataj. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo.

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83 (Swift: PCHQBEBB)

**Perantoj**

*Internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, reto financoj(a)fel.esperanto.be, belga pĝk. 000-0265338-43)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)



## Anoncitaj aranĝoj

**TEJO seminario 'Lingva ĉielarko - ponto al kulturaj trezoroj'**, 25.03.-01.04.2001 en Eŭropa Junulara Centro (Budapeŝto). Ĉeforganizanto: Katerina Evlampieva, Rusio <kat-jevl(a)cbx.ru>. Informoj: Ĵenia Zvereva <eugenia_zvereva(a)yahoo.com>

### Fakprelegoj en popularscienca stilo

La 49a Printempa Staĝo de Orient-Franca Esperanto-Asocio okazos la 20an, 21an kaj 22an de aprilo 2001 en montara vilaĝo Storckensohn, je 40 km de urbo Mulhouse en orienta parto de Francio. Ĝin organizas la loka grupo Mulhouse-Esperanto kun la kutimaj kursoj por komencantoj, progresantoj kaj praktikantoj.

Aldone al tio okazos seminario, kiu ricevos specialan pritrakton. Du fakaj asocioj, TAKE kaj IKEF, prizorgos serion da prelegoj fare de fakuloj pri plej diversaj temoj sed en popularscienca stilo por klera publiko. Jen kelkaj el la planitaj prelegoj:

Kemio por nutraĵoj (Robert Dueny, F)
Konstru-fiziko (Fabien Van Mook, NL)
Polderoj en Nederlando (Peter Den Breems, NL)
"EVG"-konstruado kaj ĝia elektra muntaĵo-sistemo (Zoltán Könyves, H)
Esperanto kaj ties literoj en komputilo kaj reto (André Grossmann, F)
Komerco per la reto (*e-commerce*) (F.J. Braun, D)
Memortekniko (Rainer Kurz, D)
Spertoj el la staĝo en ĉina komerca firmao (Violette Walther, F)
Sistemo de Komercaj Ĉambroj en Francio (F.X. Gilbert, F)

Pliaj informoj estas haveblaj ĉe s-ro Robert KUENY, 30 Rue des Champs,
FR-68690 GEISHOUSE, Francio; tel. 33(0)3.89.82.37.62;
rete <mulhouse.esperanto(a)mageos.com>

## Korespondpeto

Mi estas vic-ĝenerala sekretario ĉe B.E.JE: Bureau pour l'Encadrement de la Jeunesse, neregistara organizo el Konga Demokrata Respubliko. Nia organizo havas butikon, apotekon, bibliotekon kaj lingvajn lernejojn. Ni volas korespondi kun aliaj esperantistoj tutmonde.

S-ro Jerry MBEMBA, <bejebbi(a)hotmail.com>, B.P.15188, Kinshasa I, Congo D.R.

**Lernu komercon interrete kaj esperante**

Ekde de la jaro 2001 la Internacia Lernejo de la Ekstera Komerco (Krakov, Pollando) planas instrui ankaŭ en Esperanto. En la lernejo eblas studi je universitata nivelo pere de reto, ekzemple kiel uzi reton por la ekstera komerco.

La lernejo laboras ekde la jaro 1991. Ĝi estas privata kaj postmezgrada lernejo. Komence ĉe ĝi studis nur poloj, sed poste alvenis studentoj de Rusio kaj Ukrainio. Nun estas studentoj ankaŭ el Rumanio kaj Slovakio.

La instruistoj estas profesoroj de Jagiellona Universitato (unu el plej malnovaj kaj plej konataj universitatoj en la mondo, ekzistanta de pli ol 600 jaroj) kaj de aliaj krakovaj altlernejoj.

Eblas studi universalajn kaj internaciajn principojn de la ekstera komerco, kiuj estas uzataj en ĉiuj civilizitaj landoj. Ekde 2001 oni proponas lerni ankaŭ esperante, ĉar Esperanto estas tro malmulte uzata en la negoco, ekstera komerco, ktp.

Studado pere de interreto estas malmultekosta. La lernejo sendas al siaj studentoj lernolibrojn en la formato *.PDF. La lernolibroj estas verkitaj tre klare kaj simple, por ke ĉiuj povas kompreni la informojn. Ĉiusemajne eblas kontaktiĝi kun la profesoro por ke li klarigu la problemojn, se estas. Ĉiuj studentoj havas kontakton inter si, por ke helpu unu al alia. Eblas lerni kie kaj kiam vi volas, ne perdante tempon kaj monon por veturado al la lernejo.

Daŭro de la studado dependas de la lernanto. Oni povas ĉion fini dum 1 jaro aŭ studi 10 jarojn. La kostoj de la lernado estas tre malaltaj (10-25 USD monate, depende de la lando). Pagi oni povas pere de banko.

Elkore mi invitas vin!

Nina Jaskiewicz - direktoro
(http://www.avp-promocja.kki.pl - retadreso: ninajaskiewicz(a)kki.net.pl)

**Novaj (ret)adresoj**

185. Harald Schicke: Schoolbrink 12, D-27383 SCHEESSEL-HETZWEGE, www.mz-verlag.de

216. Manuel José Pinguinha: <esperantoguteto(a)oninet.pt>

Kun ĉi tiu numero de La Merkato la membroj ricevas kompletan adresliston de la membroj. La liston de retadresoj prizorgas la ĉina peranto, s-ro Wang Tianyi (v. je p. 2).



**Komercaj petoj kaj proponoj**

**Bjelorusio**

1. Merkatesploroj, prefere je industriaj varoj. Estas sperto kun germanaj kaj polaj firmaoj.
2. Reprezentado de interesoj de eksterlanda firmao en Bjelorusio kun solvo de juraj kaj doganaj demandoj.
3. Helpo je serĉo de konvenaj bjelorusaj kompanioj por komercado en diversaj sferoj.
4. Akceptas aliajn komercajn proponojn.

Lingvoj: Esperanto, pola, germana, rusa. S-ro Henadzi Kurhun (IKEF 297),
Prospekt J. Kupaly 54-64, BY-230010 GRODNO; fakso (of) +375 152 750276,
tel. (of) +375 152 444260, rete <hena1(a)yes.ru>

**Ĉeĥio**

S-ro Bretislav Nevrly ŝatus aĉeti vinon kaj aliajn trinkaĵojn.
Adreso: Svermova 1, CZ-772 00 Olomouc; tel. 68/5222876, fakso 68/531 2592, reto <ne(a)uc.oaol.cz>. Kontakto prefere rete kaj fakse.

**Ĉinio**

Post unu jaro da praktiko Xi'an Zhiyuan Internacia Kultura Kompanio (XZIKK) oficiale prenis Esperanton kiel ilon en sia komerca agado. La kompanio celas uzi Esperanton en turismo, komerco, kulturo, edukado kaj aliaj kampoj kunlaborante kun eksterlandaj organizoj kaj individuoj. Informoj: s-ro Qiu Shi, Huanchengnanlu Xiduan 29-602#, CN-710068 Xi'an. Telefono/fakso: +86-29-8412463.
Retpaĝoj http://www.e-reto.com. Retadreso: ioelreto(a)pub.xaonline.com (ret-info)

Mi estas 44-jara vic-estro de la Fuzhou-urba E-Asocio kaj diplomito el universitato. Mi funkciis kiel vic-estro de kompanio kaj nun mi estas manipulanto de akcioj en valor-papera kompanio jam tri jarojn. Mi lertas pri aĉeto kaj vendo de akcioj. Ĉinio fariĝos membro de Monda Komerca Organizo (WTO). Tio signifas ke investantoj el fremdaj landoj rajtos rekte eniri en ĉinan valorpaperan merkaton. Personoj interesitaj bonvolu fari kontakton kun mi! S-ro Huang Ting-sheng, Yangtoukouxincun, 5 zuo 4 zhuang 507 hao, Taijiangqu, Fuzhou, Fujian. Telefon- kaj telefaks-numero (hejme): 0591-3363905, rete <nasko(a)21cn.com>.

**Kamerunio**

Adrien TANGNING NGANKAM, B.P. 343 DOUALA, KAMERUNIO, retpoŝto <tnadrien(a)yahoo.fr> dezirus komerci en eŭropaj landoj sekajn fruktojn kaj volas eltrovi en kiaj landoj oni jam vendas tiajn fruktojn.

## IKEF-Laborplano 1998-2003

En nia Ĝenerala Kunveno 1998 en Montpeliero ni akceptis la Laborplanon 1998-2000, kiun ni estis ellaborintaj kadre de la UEA-kampanjo 2000 por internacia lingva ordo. Tiu laborplano, kiun vi trovas sur la apuda paĝo, enhavas diversajn celtrafajn agadojn (celtrafe en la senco de nia laŭstatuta celo AKCEPTIGI/ENKONDUKI ESPERANTON SUR LA KAMPOJ KOMERCO, EKONOMIO KAJ EKONOMIKO). La estraro tiam elektis specife ĉi tiujn agadojn, ĉar ili havas realisman ŝancon por realigo.

Tamen, kiel ĉiu de vi povas konstati, multaj el la agaderoj estas ne aŭ nur parte realigitaj ĝis fine de la jaro 2000. Multo el tio devas ankoraŭ esti farata. Konsciante tion, la ĉi-jara Ĝenerala Kunveno je 28 julio 2000 en Tel-Avivo decidis senmodife plivalidigi tiun laborplanon je tri jaroj, do ĝis fino de 2003. Temas nun pri LABORPLANO 1998 - 2003!

Hodiaŭ mi volas atentigi vin al cifero 1.4.2 b):

*Okazigi similajn vizitojn dum aliaj Esperantoj-aranĝoj, kondiĉe ke almenaŭ tri IKEF-membroj ĉeestas la aranĝon.*

Tiu agado rilatas al numero 1.4.2 a) Okazigi vizitojn dum UK-semajnoj ĉe lokaj entreprenoj kaj/aŭ ekonomiaj institutoj. Ĉi tiu agadero estas sendube efektivigata en modela maniero, ĉar en Montpeliero 1998, en Berlino 1999 kaj en Tel-Avivo 2000 ni ĉie faris vere interesajn kaj informriĉajn vizitojn.

La ideo de 1.4.2 b) estas kopii tion kio bone funkcias dum UK, ankaŭ por landaj, regionaj aŭ aliaj gravaj kongresoj kaj aranĝoj. Ni ja celas al tio, ke ni prezentu Esperanton en la praktiko per bona funkciado al ekonomiaj instancoj. La minimuma kvanto de tri personoj estas logika, dezirinde estus pli.

Tia vizito devas esti preparita de loka IKEF-ano, kiam li/ŝi ekkonas el la aliĝoj al la kongreso/aranĝo la ĉeeston de pluraj IKEF-anoj. La preparo de la vizito havas la avantaĝon de persona interkonatiĝo inter ĉiuj ĉeestantaj IKEF-membroj kaj de komuna pritraktado de la celoj de IKEF por prezenti sin al la vizitota firmao/instituto.

Ĉio estas grava: la persona interkonatiĝo de la membroj, la pritrakto de IKEF-celoj kaj prezentado surloke, la ricevo de valoraj fakaj informoj de la vizitota firmao/instituto kaj finfine bona impreso pri Esperanto kiel serioza afero ĉe la vizitotoj.

Franz Josef BRAUN



IKEF-LABORPLANO 1998-2000, kadre de UEA-Kampanjo 2000
por internacia lingva ordo, aprobita dum la ĝenerala kunveno de IKEF

| cif. UEA | speco de agado | responsulo ↓ | prioritato↓ |
|---|---|---|---|
| 1.4.1 | Kampanjo "por pli vasta verdujo"<br>Pligrandigi la membraron de IKEF | | |
| | a) Difino de celgrupoj varbotaj<br>Ĉiuj homoj, kies profesio aŭ pangajna laboro rilatas al komerco, ekonomio kaj ekonomiko | estraro | 1 |
| | b) Difino de membronombro atinginda<br>200 membroj ĝis fino de 2000 | estraro | 1 |
| | - moto: Ĉiu membro varbu novan membron | ĉiuj m. | 1 |
| | - sendigi varbleteron tra UEA al ĉiuj UEA-membroj , kies profesio rilatas al nia fako | prez. FJB | 1 |
| | c) Krei argumentaron por "vendi" IKEF al siaj celgrupoj; establi laborgrupon por tio | prez. FJB | 2 |
| 1.4.2 | Celtrafaj IKEF-aj agadoj | | |
| | a) Okazigi vizitojn dum UK-semajnoj ĉe lokaj entreprenoj kaj/aŭ ekonomiaj institutoj | prez. FJB | 1 |
| x<br>x<br>x | b) Okazigi similajn vizitojn dum aliaj Esperanto-aranĝoj, kondiĉe ke almenaŭ tri IKEF-membroj ĉeestas la aranĝon | koncerna-taj mem-broj | 2 |
| | c) Havigi reklamanoncon de entreprenoj al E-gazetoj | ĉiuj mem-broj | 1 |
| | d) Instigi kaj subteni negocon inter E-istaj komercistoj | ĉiuj mem-broj | 1 |
| | e) Terminara laboro | Yamasaki | 1 |
| | f) Verki fakajn artikolojn en E-gazetoj | membroj k. ĵurna-lisma ta-lento | 1 |
| 2.1.1 | Disvastigo de informoj pri E-o, UEA kaj IKEF | | |
| | a) Regule ĝisdatigi kaj ampleksigi la IKEF-ajn informpaĝojn en TTT | B. Holm | 1 |
| | b) Plibonigo/plirapidigo de la komunikado inter membroj per uzo de retpoŝto | ĉiuj mem-broj | 1 |
| | c) Produkti nian IKEF-informilon E-lingvan ankaŭ en la plej gravaj naciaj lingvoj; krome tiaj tekstoj aperu in interreto | redaktoro RR | 2 |
| | d) Post ricevo de la plej bonaj informiloj nun ekzistantaj kaj tradukeblaj el naciaj lingvoj, kiujn la UEA-estraro elektos, ni kunhelpos al traduko kaj disvastigo (nur de tiuj kiuj iom rilatas al nia fako) | Yamasaki S. | 3 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 3.5 | Kontaktoj kun ekstermovadaj instancoj, kies aktivecoj rilatas al la celoj de IKEF<br>a) Komisiono de EU - Ekonomia Direkcio<br>b) Naciaj ministerioj pri ekonomio<br>c) Ekonomia fakultato de universitatoj kaj ko-mercaj altlernejoj<br><br>d) Komercaj Ĉambroj | <br><br>M. Cwik<br>prez. FJB<br>sciencis-toj pri ekonomio<br>membroj kun kon-taktoj al K.Ĉ. | <br><br>2<br>3<br>2<br><br><br>2 |



**KAEST 2000: Renkontiĝo de fakaj aplikantoj de Esperanto**

De la 10a ĝis 12a de novembro okazis en Prago kolokvo 'Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko' kiun aranĝis Ĉeĥa Esperanto-Asocio kiel sian kontribuon al Kampanjo 2000 sub aŭspicioj de UEA. Ĝin partoprenis entute 41 personoj el 11 landoj (BE, BG, BI, CZ, DE, DK, FR, HU, NL, SE, SK).

Traktado okazis en tri sinsekvaj sekcioj, nome 'Ekonomio sojle al la tria jarmilo' (7 kontribuoj), 'Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto' (10 kontribuoj) kaj 'Scienco kaj tekniko ĝenerale' (4 kontribuoj).

Dimanĉe ĉe 'ronda tablo' la partoprenantoj diskutis estonton de KAEST kaj estis fiksita la venonta dato post du jaroj en tradicia tempo, do 2002-11-8/10. Kiel temo de la unua sekcio estis difinita "Elektronikaj rimedoj", dum la temoj de la dua kaj tria sekcioj restos tradiciaj. Estis ankaŭ rekomendite, ke la tradicia aranĝo ŝanĝu sian nomon al "Konferenco" anstataŭ "kolokvo", kion la lokaj organizantoj surloke akceptis.

Antaŭ la kolokvo okazis terminologia seminario pri fervoja transporto kaj trafiko en Dobrichovice apud Prago sub aŭspicio de IFEF. Ĉeestis ĝin nur 8 partoprenantoj de 3 landoj (CZ, DE, DK), tamen ĝiaj partoprenantoj esprimis kontenton pri eblo povi profunde sen tempa premo pridiskuti terminarajn problemojn de sia fako kaj deziron ripeti ĝin antaŭ venonta KAEST.

Al la kolokvo kontribuis pluraj IKEF-membroj:

- Josef Mendl (CZ): *Kiel ekkompreni duoblan librotenadon*
- Rainer Kurz (D): *Profesia organizo de Esperanto-organizaĵoj: ĉu tio estas nur vizio?*
  La paroladanto komparis la labormetodojn de la plej efikaj firmaoj (kiuj havas pagitajn dungitojn) kun tiuj de la Esperanto-organizaĵoj.
- Jiri Patera (CZ): *La nomoj kaj simboloj de diverslandaj valutoj*
- Bo Sandelin (S): *La fondado de ekonomiko - Adam Smith kaj la klasika skolo*
  Serio pri tiu temo aperos ekde februaro 2001 en la revuo Monato; ĝi poste ankaŭ estos eldonata libroforme.

(laŭ informoj de Petro CHRDLE, Rainer KURZ, Bo Sandelin)

**Inkotermoj 2000: kurso sur CD-ROMo**

La Internacia Komerca Ĉambro ĵus eldonis CD-ROMon 'Incoterms 2000 Multimedia Export' (nur en angla lingvo). En tiu lerniga komputila programo ĉiu inkotermo estas klarigita per fotoj, panoramoj, ktp. Per ekzercoj eblas testi la konon de la lernanto.

La CD-ROMo kostas proksimume 500 eŭrojn, depende de la lando. Por pli da informoj kaj mendoj, jen la retpaĝoj de IKĈ-librovendejo: www.iccbooks.com.